**Informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj 56 en Klaipėda, Litovio**

# LUMTURO

Redakcia retadreso: chojus@gmail.com
http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56

**N-RO 2** | 2022 07 10, dimanĉo

## Salutmesaĝoj

**Simonas Kairys,**
**ministro pri kulturo**



**Estimataj flegantoj de la lingvo Esperanto,**

mi salutas vin, kolektiĝintajn en nia havenurbo por Baltiaj Esperanto-Tagoj, por la sencoplena aranĝo, dediĉita al la 770-a datreveno de post la fondo de la urbo Klaipėda kaj al la 135-a datreveno de post la apero de la lingvo Esperanto.

La internacia lingvo Esperanto ĝis nun estas tre interesa mondskala kultura fenomeno. Ĝin en la fino de 19-a jarcento en Veisiejai kreis unu el la plej famaj litvakoj, la kuracisto Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu idealisme kredis, ke ĉi tiu komuna lingvo povas unuigi la popolojn kaj plifaciligi la kunlaboradon. Omaĝe al ĉi tiu humanisto, al lia misio kaj verkoj, en Veisiejai kaj aliloke en Litovio estas eternigita lia rememoro.

Estas mirinde, ke la lingvo Esperanto eltenis elprovojn de la tempo, kaj tutmonde estas eldonataj libroj kaj periodaĵoj, funkcias radioelsendoj, okazas aranĝoj de esperantistoj.

Dezirante al la partoprenantoj de BET en Klaipėda sukcesan laboron, sencoplenan kaj varman kunestadon, mi samtempe ĝojas, ke eksterlandaj partoprenantoj havos eblecon pli proksime konatiĝi kun litovaj lingvo kaj kulturo.

Vivu Esperanto!

**Simonas Kairys,**
**ministro pri kulturo**

**Vytautas Grubliauskas,**
**urbestro de Klaipėda, Alta protektanto de BET-56**



**Estimata esperantista komunumo,**
**Estimataj partoprenantoj de la Baltiaj Esperanto-Tagoj,**

Mi salutas vin, kolektiĝintajn je la nomo de bela celo – flegi la internacian lingvon, ekkoni ĝiajn fontojn, signifon kaj sencon. Samtempe via agado estas penoj plivastigi kulturan kunlaboradon, plifortigi ligojn inter loĝantoj de la Baltia regiono, ankaŭ kunigi vastan internacian komunumon. Mi dankas ĉiun, kiu kontribuas al la esperantista agado, kaj strebas, ke ĉi tiu lingvo estu viva kaj plenumu sian veran mision – proksimigi la popolojn, instigi ilin al reciproka ekkono kaj kunlaboro.

Mi kredas, ke la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj estos ne nur bela kaj sencoplena amasiĝo, restigonta neforgeseblajn impresojn, sed ankaŭ nova trampolino por efektivigo de viaj streboj kaj ideoj.

La amo kaj atento al la lingvo Esperanto kaj ĝia misio unuigu vin kvazaŭ fortika ponto, kaj instigu antaŭeniri, porti vian ideon al pli vastaj homaj rondoj kaj eksenti ankaŭ reciprokan ligon – komprenon, ke malgraŭ diferencoj ni ĉiam povas trovi ion, kio unuigas nin.

Klajpedo atendas vin, mi esperas, ke ankaŭ vi atendas Klajpedon, do ĝis la renkontiĝo en la litova havenurbo!

Ĉiam via kaj kun vi,

**Vytautas Grubliauskas, urbestro de Klaipėda**

## Salutmesaĝoj

**D-ro Seán Ó Riain,**
**prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio**



Kiel prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) estas mia granda plezuro sendi varmajn salutojn kaj gratulojn al BET. La baltaj landoj havas riĉan Esperanto-tradicion kaj estas mirinde vidi BET rekomenci fizike post la jaroj de la pandemio.

Kiel vi scias, dum la pasinta jaro EU faris Konferencon pri la Estonteco de Eŭropo. La plej populara propono en la eduka areo, kaj la 5-a plej populara el ĉiuj 16.000 proponoj ricevitaj de civitanoj, estis la propono de EEU pri la Multlingva Akcelilo. Tio baziĝas sur dujara programo en Bulgario, Kroatio kaj Slovenio, financita fare de EU Erasmus +, por uzi limigitan kaj zorge elektitan kvanton da Esperanto por prepari bazlernejanojn por lerni aliajn lingvojn. Malgraŭ sia populareco la EEU-propono ne estis menciita en la konkluda dokumento de la Konferenco, pro manko de scio pri Esperanto kaj fortaj antaŭjuĝoj bazitaj sur manko de scio.



La strategia celo de EEU nuntempe estas, ke pli kaj pli multaj EU-landoj oficiale agnosku Esperanton kiel portanton de kulturo, kaj nacia kaj eŭropa kulturo. Pollando oficiale agnoskis Esperanton en 2014, kaj Kroatio faris tion en 2019. EEU petas, ke la baltaj landoj faru similan klopodon por akiri oficialan agnoskon de Esperanto je nacia nivelo. Tia rekono estas la plej bona respondo al tiuj, kiuj ripetas, ke Esperanto "ne havas kulturon". Tiel ni havas multan laboron por fari, sed mi certas, ke ni faros ĝin. Ni fosu nian sulkon!

Samideane via,

**d-ro Seán Ó Riain,**
**prezidanto de EEU**

## Gravaj atentigoj

**1. Organiza komitato** de BET-56 estas en la konferenca salono sur la unua etaĝo de la konstruaĵo n-ro 11.

**2. Libroservo** funkcias ĉiutage en la konferenca salono samloke.

**3. Redakcio de la ĉiutaga gazeto „Lumturo"** funkcias en la konferenca salono samloke.

**4. Du grandaj aŭditorioj 1 K kaj 2 K** troviĝas en la konstruaĵo n-ro 11 sur la dua etaĝo.

**5. Ĉefa salono** por vesperaj kulturaj programeroj estas en la konstruaĵo n-ro 6 (Aŭlo).

**6. Diversaj prelegoj, kunvenoj, Esperanto-kursoj** okazas en la salonoj n-roj 119, 216, 314, 315 en la konstruaĵo n-ro 5.

**7. Salono de la universitata Senato** estas en la konstruaĵo n-ro 1.

**8. Salono de la rektorejo** estas en la konstruaĵo n-ro 2.

**9. Manĝejo** estas en la konstruaĵo n-ro 11 sur la dua etaĝo kaj funkcias ekde matenmanĝo dimanĉe la 10-an de julio.


**10. Solena inaŭguro de BET-56** okazos en la urba koncerta salono (str. Šaulių 36). En la unua numero de Lumturo troviĝas kiel atingi la lokon.

**11. Registrado al la ekskursoj** okazas en la akceptejo sabate, dimanĉe kaj lunde (la 9-an, 10-an kaj 11-an de julio).

**12.** En la prelegejoj **WIFI estas Eduroam**:
user: svecias.stud@ku.lt
pass: liepa123

**Grava rimarko:** en Litovio la teretaĝo titoliĝas kiel la unua etaĝo kaj tiel supren. Do, la teretaĝo ne ekzistas.

**Organiza komitato**




## Programo

**La 11-an de julio (lundo)**

09.00–10.30: Matenmanĝo (en la konstruaĵo n-ro 11)
11.00–12.00: Prelego de prof. Aloyzas Gudavičius pri la litova lingvoj, kulturo, historio (1 K en la konstruaĵo n-ro 11)
11.00–12.00: Prelego de prof. Amri Wandel pri spacteleskopoj (2 K en la konstruaĵo n-ro 11)
11.00–12.00: Prelego de Mikaelo Bronŝtejn "La Katastrofo kaj ties bardoj" (salono de la universitata senato en la konstruaĵo n-ro 1 per Zoom)
11.00–13.00: Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (119, 216, 314, 315 en la konstruaĵo n-ro 5)
12.00–13.00: Prelego de prof. Ilona Koutny "Etapoj kaj evoluo de Esperanto" (1 K)
12.00–13.00: Prelego de prof. Duncan Charters "Kion oni instruu pri kulturo en klasoj de Esperanto" (2 K)
13.00–14.30: Tagmanĝo
15.00–16.00: Prelego de Grażyna Szubryczyńska "Esperanto en infanĝardeno" (1 K)
16.00–17.00: Prelego de Tuomo Grundström pri la verkistino Hella Maria Wuolijoki (1 K)
16.00–17.00: Prelego de Margarita Želve "Kvar granddamoj de Latvia Esperanto-poezio" (2 K)
17.30–18.30: Vespermanĝo (memstare)
19.00–21.00: Koncerto de Sepa kaj Asorti (Aŭlo en la konstruaĵo 6)

### Pri la litovaj lingvo kaj kulturo



Prof. Aloyzas Gudavičius el Šiauliai (Litovio) en BET-56 gvidos kurson pri la litovaj lingvo kaj kulturo. La kursanoj konatiĝos kun la fundamentoj de la litovaj fonetiko kaj gramatiko, povos ellerni bazajn litovajn vortojn kaj la plej oftajn ĉiutagajn esprimojn. Samtempe oni priparolos la plej gravajn trajtojn de la litovaj historio kaj kulturo... (Bv. legi la 48-an paĝon de BET-Libro.)

Tamen, bedaŭrinde, pro sia malsano prof. Aloyzas Gudavičius ne povis veni al BET-56 por gvidi la planitan kurson. Anstataŭ li la kurson gvidas **Aida ČIŽIKAITĖ**.

## Instruado dum BET-56


Dimanĉe, la 10-an de julio, komenciĝas la unuaj lecionoj de ĉiunivelaj Esperanto-kursoj en **aŭditorioj de la konstruaĵo n-ro 5**. Jen estas la konciza prezento de la instruado dum BET-56.



**1. Veraj komencantoj** lernu en A1. Ili lernu kun Aida Čižikaitė, kiu estas diplomita Cseh-instruistino kaj nun instruas al studentoj de Litovia Universitato de Sansciencoj.
Aida jam instruis ne nur komencantojn, gimnazianojn kaj studentojn en Kaunas, sed ankaŭ gvidis kurson en itala kongreso.



**2. Komencintoj,** kiuj jam iom lernis Esperanton, scias la ofte uzatajn vortojn, kapablas kunmeti simplajn frazojn kaj komprenas mallongajn tekstojn elektu la nivelon B1.
Kun ili laboros fidela instruistino de litovaj BET-oj Nina Pietuchowska de Pollando.



**3. Progresantoj,** kiuj jam povas elturniĝi en la ĉiutaga konversacio, sed sentas mankon de vortoj kaj volas praktiki la lingvon, estas atendataj en la nivelo B2.
Sprita kaj sperta instruisto Mikaelo Lineckij lerte paroligos ilin.



**4. Novaĵo en BET estos paroligaaktiviga kurso,** kiun gvidos sperta instruistino Dalia Pileckienė. Ŝi jam multfoje instruis en eksterlandoj (Finnlando, Francio, Italio), gvidis aktivigajn seminariojn dum UK-oj.
Al partoprenantoj de BET Dalia proponos temojn, kiuj devigos kaj pensi, kaj aktivi, kaj paroli en la internacia lingvo. En la kurso atendataj estas jam almenaŭ meznivele parolantaj esperantistoj, kiuj emas aktive partopreni.

Se vi dubas en kia nivelo vi devus esti, bonvolu serĉi dum la unua tago de BET sur la anonctabulo „Memtaksilon" kaj tio helpos al vi decidi.
Kompreneble, ĉiam eblos ŝanĝi la grupon, se vi konstatos, ke estas tro facile aŭ tro komplike por vi en la elektita kurso.
Ĉiuj kursanoj post la fino de la kurso ricevos la atestilon.

**Gražina Opulskienė**

## Scienca Universitata Sesio de AIS

En julio 2022 Scienca Universitata Sesio (SUS) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) denove okazos kadre de granda internacia kunveno.
Post dujara interrompo pro la pandemio la Scienca Universitata Sesio (SUS) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) denove okazos fizike, ĉi-jare kadre de la Baltiaj E-Tagoj (BET) en Klaipėda, Litovio. Ankaŭ la lasta fizika SUS-36 en 2019 okazis kadre de BET, samlande en Panevėžys. Pasintjare SUS-37 okazis virtuale kadre de la Germana-Pola-IFEF Kongreso.
Kiel en 2019, la AIS-kursoj de SUS-38 aperos en la oficiala programo de BET. Simile al la AIS-IKU-inaŭguro dum la UK, okazos la inaŭguro de SUS, kun specimenaj reklamaj gustumoj pri la kursoj, okazontaj dum la semajno. Por SUS-38 estas antaŭvidataj du kursoj kaj tri prelegoj, kursoj kun po tri-kvar prelegoj. Fine de la kursoj estos ebleco ekzameniĝi kaj ricevi AIS-ateston.
Kiel en 2019, dum BET aĉeteblas por speciala prezo la IKU-SUS-Libro, kiu enhavas krom la resumojn de la SUS-kursoj kaj prelegoj ankaŭ la tekstojn de 16 prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato kaj la Scienca Kafejo, okazontaj dum la UK en Montrealo.

**Amri Wandel**

**Spacteleskopoj: de Hubble ĝis James Webb** - Amri Wandel (dimanĉe, lunde, marde, je 11.00-12.00)
**Ĉu nur "aŭtentaj" materialoj kaj spertoj en lingvoinstruado?** - Duncan Charters (lunde, je 12.00-13.00)
**Pri la imunsistemo** - Alfred Heiligenbrunner (sabate, 12.00-13.00)
**Marĉoj povas kaj savi la klimaton kaj biodiversecon kaj doni enspezojn al kamparanoj** - Manfred Westermayer (sabate, je 12.00-13.00)
**Gravitaj Ondoj** - Carlo Nicola Colacino (sabate je 15.00-16.00)




Partoprenantoj de BET la unuaj havas eblecon akiri IKU/SUS-libron kontraŭ la speciala prezo. Demandu en la Libroservo de BET.

## Novaj aliĝoj

248. Fabian Sambrano AGUILAR, Italio
249. Alexandra von Arx, Svislando
250. Aleksandro SMIŠLAJEV, Latvio
251.Viktorija SMIŠLAJEVA, Latvio

**(daŭrigota)**

## Registrado al la ekskursoj

Registrado al la ekskursoj (bv. vidi BET-Libron) okazas ĝis lundo, la 11-a de julio en la akceptejo. Do, ne perdu la okazon turisme konatiĝi kun la BET-urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.
**Tuttagaj ekskursoj:**
1) Kurŝa Terlango, 2) Apudlaguna regiono
**Duontagaj ekskursoj:**
1) Japana ĝardeno, 2) Perpiede tra la malnova urbo Klajpedo

La tempon de la for veturo al la ekskursoj vi ekscios dum la registrado.

Ekskursgvidanto **Antanas Visockas**



**Saluton, karaj BET-anoj !**

Kiel kutime, ankaŭ dum **Baltiaj Esperanto-Tagoj 56** en Klaipėda aperos la ĉiutaga informilo, ĉi-foje kun la nomo ***Lumturo*** (la klarigo en la dua paĝo). En ĝi vi trovos aktualaĵojn, informojn, anoncojn pri salonoj de programeroj, eventualajn ŝanĝojn de la programo, precizigojn, priskribon de BET-56, fotojn, k.s.
Ĝia enhavo dependos ankaŭ de kontribuoj de BET-anoj mem, kiuj bonvolu raporti pri siaj impresoj, programeroj, ideoj, kursoj ktp, kaj poste aŭ metu siajn kontribuojn en tiucelan skatolon ĉe la akceptejo, aŭ sendu ilin rete (prefere) al: ***chojus@gmail.com***.
Ankaŭ fotoj en komputila formato estas bonvenaj, same kiel anekdotoj kaj rakontoj pri BET. Ĉiuokaze bonvenon al Klaipėda, kaj ĝuu la 56-an BET-on!

**CHOE Taesok, redaktoro**